# KATOLIKA SENTO




2

SPEDIZIONE
IN ABBONAMENTO POSTALE
GRUPPO IV

**KATOLIKA SENTO**

BOLLETTINO DELLA
**UNIONE ESPERANTISTI CATTOLICI D'ITALIA (U.E.C.I.)**

**Anno 50° - 1971**

Direttore Responsabile:
DON FERDINANDO LONGONI
Via S. Ambrogio 2
Telef. 99.60.050
20051 LIMBIATE (Mi)

Redattore:
P. GIACINTO JACOBITTI
Piazza Santa Maria Maggiore 8
Telef. 738.515
00185 ROMA

Presidente:
P. ALBINO CICCANTI OFM
Via S. Bernardino 26
47037 RIMINI (Fo)

Tesoriere:
DR. CARLO CESARE FERRARI
Viale dei Mille 37
Telef. 267.895
20129 MILANO

Segretario:
DR. FRANCO GALBUSERA
Via della Ghiacciaia 3
Telef. 045-22.062
37100 VERONA

Autorizzazione Tribunale
di Milano N. 6536 del 6.4.1964

# KATOLIKA SENTO

N-ro **2** - Februaro 1971

**50a Jaro**


LA HOMA KONSCIENCO ĉiam estas ema misformiĝi kaj ricevi psikajn premojn, kiuj povas ĝin misordigi kaj ali-igi. Prof. Ancona eksperimentis tion kun 40 studentoj de la katolika universitato en Milano, ripetante kelkajn cir-konstancojn, kiuj ebligis la konatajn kruelajn hororojn de nazismo. Rezultis, ke la 85 procento de la studentoj łaŭ sia konscienco sammaniere obeintaj al superaj ordo-noj, senkompate kaj ĝisfunde. Ĝuste la sama procento re-zultis el aliaj eksperimentoj faritaj antaŭ kelkaj mona-toj en Germanujo kaj en Usono. Tio montras kiel erara estas la teorio, ke la konscienco estas per si mem nor-mo de moraleco. Male, ĝi devas esti ĉiam regulita, ko-rektita de la dia leĝo, konfidita de Dio al la eklezia ins-truado.

LA VOJAĜO DE LA PAPO al ekstrem-orientaj landoj e-stis priskribita endu paĝoj ankaŭ en Espero Katolika, aŭ pli ĝuste, kritikita, ĉar ekde la titolo kun granda de-manda-signo, ĝis la lasta vorto estas nur kritikoj kaj akuzoj al la papo. Se ĉi tio ne estus la kutima teda ĝis-nuna sinteno de tiu revuo, ni povus ŝerce diri: la aŭto-ro kutimas reprezenti du laŭŝajne egalajn bildetojn, kaj oni estas invitataj trovi en la dua 8,10... erarojn. Ĉifo-je oni estas invitataj kalkuli la nombron de la kritikoj al la papo en la dirita artikolo. Ni trovis ĉirkaŭ tridekon. Rekord-vojaĝo? demandas la aŭtoro. Rekord-kritiko! - respondas ni.

CENTRO ESPERANTISTA CATTOLICO ROMANO
N° 90

DANK' AL NIA s-ano Luigi Minnaja, ni povis aŭskulti ĉi tiun delikatan poemeton, kiun li deklamis en nia kunveno. Ni volas per tio aperigi nian februaran numeron por la plezuro de niaj legantoj.

KORBATOJ

En la profeta orienta lando
naskiĝis hom', li estis Dio-filo:
martir' signita, la homarsavanto,
surkruce mortigita per pikilo.
Tero de sang' viktima kaj adoro:
tie angore batas mia koro.

Urbeto suda de l' unua ĝemo
en la plenluna nokto januara!
La dormon gardas ĝi, per rekviemo,
de miaj patroj je memoro kara.
Kiam vespere dolĉas pli la horo,
tie revante batas mia koro.

Burĝonis norde la membraro ida;
petolo ĉarma de la genepetoj
gajigas hejmon per la lipo rida,
kaj venkas senton de l' animsekretoj.
De mia viv' ripeto, rememoro:
tie tenere batas mia koro.

Benataj rondoj de l' konkordo vera,
kie la nomo "frato" vaste sonas,
la solidaro estas tutsincera,
kaj nur spirito paca daŭre tronas.
Mondo feliĉa en la kunlaboro:
tie sopire batas mia koro.

Etoso pia, al medit' invita,
edifa fonto de l' homama leĝo,
al ni ĉe la naskiĝo transdonita:
alten sin levas la himnanta preĝo.
Sidejo sankta de la Di-favoro:
tie mistike batas mia koro.

Roma, 14/1/1971 Luigi Minnaja

ALIĜIS AL UECI-CECR kun la bulteno: Romo: L. Minnaja; C.Cimino; J.Korytkowski; M.Tomassini; L. Senes; Bolonjo: G.Gamberini; G.Galletti; Cagliari: V. Corrias; Catania: G.Zappulla; G.Bruno; Clusone:(BG) G.B.Cadei; Florenco: O.Risaliti; Fossalonga (TV) F. Casonato; Ĝenovo: A.Schmuckler; Limbiate (MI)F.Longoni; Milano: G.Polerani; G.Corrado; L.Ferrari; G. Tanzi; Mondovi:(CN) F.Orlandini; Napolo: A.Jacobitti; Novara: G.Pisoni; Padova: C.Minnaja; Rho (MI)N. Minnaja; Savigliano (CN): M.Mariano; M. Dogliani; Torino: S.Brusa; Treviso: S.Boschin; Venezia: G. Rosada; Vercelli: M.Sola; L.Praglia; Brazilio: A. Guiomar; Ĉeĥoslovakio: M.Mrazovà; B.Malcovà; A. Berka; A.Dlugi; Germanujo: G.Wagner; Hispanujo: F. Navarro; A.Jimenez; Hungarujo: J.Doboŝ; V.Ruszina; P.Katona; Koreo: Ĵeong Ĵong-Hiu; Nederlando: E.Paesmans; Pollando: F.Walas; L.Kosienjak; E.Smarzlik; A.Gucwa; Usono: S.Klimowicz. - Entute/ 218 - (Ni petas pardonon, ĉar kelkaj nomoj de aliĝintoj, forgesitaj siatempe, aperas nur nun.)

BONFARA KASO: Tria listo por Pakistano:£ 20.000: Ruszina (Hungarujo);6.000:Karulovà (Cehoslovakio); 3.000 Mariano; 1000: Gamberini, Sias O., Canevari, Minnaja N., Galiardi, Galeotti; malpligrandaj oferoj:

Bizzoca. Entute: 130.000. Ni jam transdonis al la Papo tiucele, la 10-an de Januaro: 100.000.

SED JEN, ANKAŬ de Rumanio, trafita de teruraj huraganoj, venis al ni helpkrion. S-ano E.Zagori, (li mem havis la domon ruinigita pro la furiozo de la inundoj) petas helpon por du familioj: (inter miloj same suferantaj) monon, nutraĵojn, vestaĵojn, litkovrilojn, ks.. Sed li atentigas, ke tiuj helpoj estu sendataj rapide, ĉar la loka registaro disponis por ĉi tiuj pakaĵoj provizoran haltigon de dogankostoj, ĝis la duono de aprilo. Kvankam nia Grupo jam klopodis malavare por Pakistano, ni volis diskonigi la novan peton. Kaj tuj ni komencis ricevi ion pri mono kaj vestaĵoj. Dum ni atendas ankoraŭ oferojn de la aliaj, kaj ankaŭ de la malproksimaj niaj legantoj, ni jam komencis elspedi la unuajn helpojn. Kiu volas el niaj katolikaj legantoj helpi la suferantajn fratojn? Ni memoru la vortojn de la Sinjoro: Mi malsatiĝis, mi soifis, mi estis nuda, kaj vi helpis min: nun venu, benataj, en la domon de mia Patro! (Oni povas sendi al ni, kiel dirite, aŭ rekte al la bezonantaj familioj:

S-ino Illyes Luiza, str.Gàbor Aron, 30 - Covasna Rumanio

S-ro Arpad Zagori, str.7 Nojembrie, 121 - Sighisoara Rumanio.

GRAVA INFORMO! Preparе al la "Semajno por Amikeco" (21-an - 27-an de februaro) en kiu ĉiuj esperantistoj sendas reciproke salutojn el kaj al ĉiu mondparto, ni pretigis bildkarton kun la emblemo kaj la indiko de la iniciato, kaj kun poemo de s-ano L. Minnaja en la dorsa flanko. La bildkarto tre taŭge inspirita por la cirkunstanco, kostas nur dek it.lirojn. Petu ilin de ni tuj, por povi uzi ĝin akurate!

LASTATEMPAJ AGADOJ de la Roma Esperanto-Grupo. Dum la lastaj monatoj ĝiaj agemaj anoj tre aktive propagandis kaj varbis per kursoj. Kunlabore kun la Fervojista Postlaboro estis algluitaj en multaj ĉefaj stratoj de la urbo 300 grandaj afiŝoj, kiuj varbis por publika kurso. Sekve de ĉi tiu afiŝado pluraj centoj da homoj telefonis al la oficejo de la Postlaboro por peti informojn. El la multaj petintoj trideko aliĝis al la kurso, kiu estos oficiale malfermita la 3-an de februaro en via Bari 22. Oni atendas de ĉi tiu kurso gravan fortikiĝon kaj de la Esperanto-sekcio fervojista kaj de la tuta Roma grupo. Informo pri la kurso kaj pri la ĉijaraj Universala Kongreso kaj Internacia Kongreso de Esperantistoj-Fervojistoj aperis en "Il Messaggero". La kurson gvidos d.ro Menabene. Sekve de disdonado de flugfolioj oni remalfermis fare de liceanoj-esperantistoj en Liceo Albertelli ankaŭ ĉijare unuagradan kurson vizitatan de dekkvino da gejunuloj. Funkciis dum la pasintaj monatoj ankaŭ duagrada kurso por tiuj, kiuj pasintjare sukcese akiris la unuagradan diplomon. En decembro kaj januaro kelkaj junaj membroj de la grupo eksperimentis novan (en Romo) propagand-manieron, disdonante flugfoliojn al homoj preterpasantaj en la stratoj, antaŭ vendejoj, antaŭ preĝejoj, ktp. Krome ili efektivigis disdonadon ankaŭ en la Universitato kaj pretigis per farbo afiŝojn algluitajn poste en lokoj plej trafikaj, kiuj invitis al kursoj malfermitaj ĉe MIR kaj Via Dulceri 47/A. Nuntempe oni pretigas propagandan materialon por inviti al debato pri la lingva problemo. La kurso ĉe MIR estis reklamita ankaŭ per anonco en "Il Messaggero", sed montriĝis ke tiu anonco, kompare al la kosto, estas malpli efika ol afiŝoj. Kompreneble kaj la afiŝoj kaj la anonco havis nerektajn rezultojn tre malfacile takseblajn (kelkaj, kiuj ne povas partopren i

la kurson, tamen lernas solaj; kelkaj profesoroj telefonis, petante propagandan materialon por siaj lernantoj, ktp.) Intensa apogo estis donita al la lerneja komisiono de IEF pri kontaktado de parlamentanoj rilate al la leĝpropono por enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Dum oni ankoraŭ klopodas por trovi taŭgan sidejon por la Roma Grupo, la ĉiumardaj kunvenoj okazadas regule en la Postlaboro Fervojista, via Bari22, je la 6-a posttagmeze.

ABONO AL NIA BULTENO UECI-CECR £1000(=$ 1,60)
Oni sendu al:
poŝtĝirkonto 3-7791: D.ro C.C.Ferrari; Viale dei Mille 37; 20129 Milano; aŭ al: pĝk. 1-37638. P.Giacinto Jacobitti; piazza S.Maria Maggiore 8; 00185 Romo.

PASTROJ, KIUJ INTENCAS ALIĜI, povas celebri unu meson intence de p. Jacobitti, nur avertante lin pri tio. Aliaj personoj, kiuj preferas tiun aliĝmanieron, povas peti la samon de katolika pastro - kiel supre - dirite -, sed estas petataj sendi al p. Jacobitti konfirmon, se eble, pri la celebr(i/o)ta meso, subskribita de la pastro. Tiuj, kiuj eĉ ne tiamaniere povas fari, kaj tamen ŝatas la bultenon, petu de p. Jacobitti ĝian senpagan sendadon.

RADIO ROMA - ESPERANTO. Februaro 1971-a.
Dimanĉon la 7-an: Insulo S.Georgo kaj Fondaĵo"Cini" en Venecio. La 4-an: La itala pentristino Rosalba Carriera; la 21-an: Italaj kanzonoj en Esperanto; la 28-an: Monto Granda Paradizo en la Alpoj. - La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". La dissendoj okazas de h. 21.00 ĝis h. 21.20 (M.E.T.) Ondlongoj: m. 30,90 - 41,24 - 50,08.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

El Romo, centro de Katolika mondo, kelkajn informojn pri la vivo de l' Eklezio:

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

PAŬLO VI PAROLIS pri ekumenismo la 17-an de januaro al la fidelularo kunveninta en la placon S. Petro: "Dum la ĵus venontaj tagoj, de la 18-a ĝis la 25-a oni celebros ankaŭ ĉijare la preĝsemajnon, por la kristanar-unueco. Ĉiuj ja konsentas, ke kristanoj devusesti unu nura koro kaj animo (Ag.4:32), unu eklezio. Tio estas unu nura komuno, kiel estis en la intenco de Kristo, kaj kiel estas en la interna postulo de la naturo de socia korpo. Oni ekvidas, male, hodiaŭ, ke iu disiĝo, eĉ multaj disiĝoj estigas enterminan kontraŭdiron: ĉar eklezio kaj videbla, reala unueco de kredantoj estas nepre la sama koncepto en la intenco kaj en la volo de Kristo. La historia realo, bedaŭrinde, kiel estas sciate, ne efektivigas la vorton de la Sinjoro: ke ĉiuj estu unu. La disiĝoj inter kristanoj, nome iliaj apartiĝoj laŭ diversaj komunoj, ne estas nur formalaj, aŭ etnaj, aŭ ritaj aŭ lokaj; ili estas bedaŭrinde profundaj kaj ĝis nun ne rekuniĝeblaj, ili rilatas esencajn kristanismajn elementojn, kredon, karitaton, kvankam la komuna bapto estas ankoraŭ komuna bazo. Tio ne povas esti: Kristo ne estas sufiĉe sekvata, interpretata, kiel li mem volas; kaj la mondo ne povas doni sian fidon al religio sanigita de vera kred-kohereco kaj interna frateca interligo. Nia katolika eklezio, malgraŭ kelkaj difektoj de ni homoj kaj de ĝia historio, humile sed firme tenas kiel si an noton kaj devon personigi ĉi tiun originalan unuecon kaj konsistigi la centron kaj la mezuron de la plena kristana komuneco. Sed la antaŭenmarŝo de la ekumenismo,

tio estas de la reveno al ĉi tiu perfekta komuneco,montriĝas malrapida kaj malfacila, kvankam ĝi faris konsolajn paŝojn: de la polemika opozicio inter la diverskredaj kristanoj, ni alpasis al reciproka respekto, al dialogo, al kelkaj praktikaj kunlaboroj; sed la unueco, se ĝi volas esti sincera, ne povas ankoraŭ esti atingita! La bona intenco de homoj ne sufiĉas por estigi ĉi tiun miraklon: necesas la kompata interveno de la Sinjoro: necesas nova spiro de la Sankta Spirito. Pro tio oni devas preĝi. Kaj al tio ni invitas vin, precipe dum la ĵus venontaj tagoj. Kaj ni petas de la Dipatrino, kiu estis en la vespermanĝejo dum la Pentekosto, ke ŝi faru sia nian humilan kaj insistan preĝon".

SED IOM PLI VASTE pri la sama temo parolis Paŭlo VI en la ĝenerala aŭdienco la 20-an de januaro. Ni resumas la ĉefajn punktojn: "Esenca propreco kaj ekstera noto de la Eklezio de Kristo, tio estas de la homaro, kiu vivas per la kredo kaj per la graco de Kristo, estas konsisti en unu nura korpo, formi unu nuran estaĵon, animiĝi per unu nura spirito, esti unu el ĉiuj hodiaŭ, dum la tempo, per la videbla kaj socia unueco de la unu kaj katolika eklezio, unika kaj universala, kaj poste , en la eterneco, en la mistika glora korpo de Kristo, ĉiam konsciantaj de nia aparta personeco, sed ankaŭ partoprenantaj en la tuteco de la Homo-Dio, nia Savanto, la tuteca Kristo laŭ S. Aŭgusteno, kapo kaj korpo kune. Je la lumo de ĉi tiu unueco, diras la papo, ni kristanoj ekvidas, ke ni troviĝas en stranga, preskaŭ absurda situacio pro nia disiĝo: ĉar ni estas ankoraŭ senigitaj de kelkaj principoj esencaj por la unueco, kiel la perfekta konsento en la sama kredkonfeso kaj en la sama kuneco de l'amo; ni estas en parta, kvankam profunda, komunio... sed an-

koraŭ ne perfekta. Kaj estas bonŝanco, ke hodiaŭ ni al menaŭ konscias pri tio. Tre malfacila estas ĉi tiu problemo: ve al tiuj, kiuj opinias, ke oni povas doni rapidajn kaj facilajn rimedojn, transsaltante la diversecon de la kredoj, kiuj motivigas la disiĝojn... La katolikoj - aldonis la papo - restu unue fidelaj kaj stabilaj en la kredo; ili ne povas pridubi sian eklezion, la katolikan eklezion, eĉ se ĝi en la historio kaj ankaŭ aktuale prezentas ne malmultajn riproĉindajn aspektojn; sed ĝia kredo, ĝia rilato al Kristo, ĝia kulto, ĝia sakramento kaj morala riĉeco, unuvorte, ĝia tuto praktika kaj doktrina ne devas esti pridiskutitaj. Ni ne rajtas pri tio. Estus manko kontraŭ Kristo, kontraŭ niaj disiĝintaj fratoj mem, se ni, celante trovi interkonsentan bazon, pridubus nian katolikan konfeson aŭ rezignu pri ĝiaj devigaj postuloj. Klareco kaj firmeco en la kredo, aldonas la papo, faras pli taŭga kaj pli ebla la dialogon. Ja, malfacila estas irado al ekumenismo, tamen rava! Ni kuniĝu humile al la preĝo de Kristo mem, en la lasta vespero de lia vivo en la tempo: Faru, ho Sinjoro, ke ni ĉiuj estu unu en vi, ke ni tion meritu; alvenu via regno!"

ĈU LA BAPTAN SAKRAMENTON oni devos doni nur al kredanto? En "Panorama" Rafaelo Baldini reprenas la ofte diskutitan temon. Fakte en la evangelio oni ne parolas pri devo de bapto al infanoj. En la unuaj tempoj, nur plenkreskuloj estis baptitaj, ĉar ili devis sin konvertante puriĝi de siaj pekoj. Sed baldaŭ ĉe familioj de kredantoj oni celis la bapton ankaŭ al infanoj. Post Origeno, kiu defendis la teorion de la origina peko, Sankta Aŭgusteno donis al ĝi teologian bazon; kaj de tiam la kutimo de la bapto al infanoj disvastiĝis pli kaj pli. Hodiaŭ kelkaj vidas en la bapto ĉefe la forigon de la ori-

gina peko kaj spiritan kontrakton, kiu postulas devojn, leĝon, al kiu la infano estos poste submetita. Ili aldonas, ke pro la progreso de la scienco, hodiaŭ ne plu devigas tiu urĝeco de la pasinteco postulita pro la mortnombro de la infanaro. Sed aliaj vidas en la bapto ĉefe aman donacon, kiun la eklezio liveras al la infanoj. Oni ja ne atendas la elektopovon de knabo, por ke li decidu, ĉu li volas aparteni al sia familio kaj al sia nacio, aŭ ricevi heredaĵon kaj ĉiuspecajn helpojn de siaj gepatroj. Eĉ ĉu la vivo mem, kiun infano ricevis ne petinte, estus eble la unua maljusteco trudita al lia libereco? Se oni pensas ke, fariĝinte pli aĝa, tre verŝajne la infano estos jam endanĝerigita kaŭze de ne taŭga medio socia aŭ familia, aŭ pro siaj mem kutimoj kaj inklinoj, oni vidos alian argumenton por la frua bapto, kiu favoras la kristanan vivon ekde ĝia komenco, kune kun ĝia disvolviĝo.

PRI LA VIZITO DE LA PAPO al la sidejo de FAO okaze de ĝia 25-vivjaro, ni jam raportis en la decembra numero, paĝ. 14. Ŝajnas tamen al ni, ke estas utile al niaj legantoj doni ĉi tie pliajn informojn. La FAO (Food and Agrikultural Organisation) naskiĝis la 16-an de oktobro 1945-a, kelkajn tagojn antaŭ la fondo de la Unuiĝintaj nacioj, kiel daŭrigo de la "Internacia Agrikultura Instituto" kun sidejo en Romo. Hodiaŭ la FAO estas unu el la organizoj de UNO (kun UNESCO, BIT, UNICEF, ktp.), kiu kunligas 121 naciojn kaj donis valoran kontribuaĵon por la evoluo al subevoluintaj landoj. De la 1950-a ĝis la 1968-a al la FAO estis alvokitaj por kunlaboro 15.000 spertuloj ĉefe por la Tria Mondo. Kaj en ĉi tiuj 25 jaroj centoj da miloj tunoj da nutraĵoj estis disdonitaj, kaj pli ol 800 milionoj da dolaroj, por la efektivigo de 600 evolu-planoj, inter

kiuj verda revolucio, problemo de okupiĝo, programo de kemiaj sterkaĵoj, luktado kontraŭ akrid-invado.

KIEL KATOLIKO POVAS opinii pri Lutero? Ni jam parolis pri tio en la 1-a n., p.23; sed ni promesis raporti ankaŭ la vortojn respondecajn kaj lumigantajn de kard. Willebrands, diritajn pri ĉi tiu temo en la V-a Asembleo de la Luterana Tutmonda Federacio. "En la luterana-katolika dialogo - diris la kardinalo, prezidanto de la Sekret. por Unuigo de Kristanoj, la kontraŭstaroj de la 16-a jarcento ne povas esti ignorataj. Tio rilatas ankaŭ la personon kaj agadojn de Marteno Lutero, kies nomon havas via vasta familio. Mi volis substreki, kun kard. Bea, ke oni ne devas ĵeti unu sur la alian la kulpon de la malfeliĉa rompo; sed oni prefere klopodu kune priserĉi la vojon por restarigi la perditan unuecon. Kiu ne volas agnoski, ke estas nepre necesa pli ĝusta aprecado de la persono kaj de la agadoj de Marteno Lutero? Dum jarcentoj la persono de Lutero ne ĉiam estis pritaksata, el la katolika flanko, laŭ sia preciza valoro kaj lia teologio ne ĉiam estas ekzakte prezentita. Tio kontribuis nek al vero nek al amo, kaj pro tio nek taŭgis al la unueco, kiun ni celas. Aliflanke ni povas kun plezuro konstati, ke dum la lastaj jardekoj inter la katolikoj iom post iom oni klopodis al pli ekzakta kompreno de la Reformo, de Marteno Lutero kaj de lia teologio. Se hodiaŭ ni parolas al vi 450 jarojn post la 1520-a mi bone konscias pri la multaj baroj, kiuj troviĝas inter ni kaŭze de Marteno Lutero kaj de lia agado. Ĉi tiuj rezervoj emigis la katolikan eklezion al malkonfida sinteno. Sed amo forpelas timon, ke ni povas esti ne komprenataj; kaj la dialogo de ĉi tiuj lastaj jaroj forigis diversajn miskomprenojn. Kiu hodiaŭ kuraĝus aserti, ke Marteno Lutero ne estis profunde religia, ke li

ne donis siajn fortojn honeste kaj sindone por la evangelia mesaĝo? Kiu povas ne agnoski, ke malgraŭ la turmentoj, kiujn li kaŭzis al la katolika eklezio kaj al la Sankta Seĝo, li konservis konsiderindan kvanton da riĉaĵoj de la antikva katolika kredo? Kaj ĉu la Dua Vatikana Koncilo ne akceptis multajn postulojn, esprimitajn interalie de Marteno Lutero, per kiuj multaj aspektoj de la kredo kaj de la kristana vivo hodiaŭ aperas pli bone ol en la pasinteco? Tion agnoski, malgraŭ la multaj diferencoj ekzistantaj, estas motivo de ĝojo kaj de espero. Marteno Lutero faris el la Biblio - kaj estis eksterordinare en tiu epoko - la starpunkto de teologio kaj de kristana vivo. En viaj preĝejoj la Biblio de tiam okupas privilegian lokon kaj estis pristudita kun ekstrema fervoro. Tamen, en Marteno Lutero, aŭdiĝas ripete vorto, granda vorto: "kredo". Lutero profunde rekonis ĝian valoron, kaj multaj personoj en, kaj ekster viaj preĝejoj lernis laŭvivi ĝin ĝis hodiaŭ. La komunaj studoj de katolikaj kaj protestantaj fakuloj rivelis, ke la "kredo" laŭ la Lutera signifo, tute ne ekskludas agadojn, amon kaj esperon. Oni povas aserti, ke "kredo" ĉe Lutero havas la saman signifon ol amo en la katolika eklezio. Cetere multajn punktojn oni povus trovi komunajn pri la teologio de la kruco, kristologio, pri la dieco de Kristo. Sed la priserĉantoj altiras nian atenton sur alian aspekton, tio estas sur la nekompletecon de la lutera doktrino kaj diversecon de formuloj, tiel ke estas malfacile precizigi liajn pensojn. Kaj anstataŭ memori pri kelkaj liaj atakoj aparte akraj kontraŭ la roma papo, kiuj malĝojigas nin, kaj estas pezo ankaŭ por vi, mi volas diri, ke estas bele pensi al tia homo, por kiu la doktrino de la justiĝo estas la artikolo, per kiu la eklezio staras aŭ falas. Li povas esti nia komuna majstro en ĉi tia kampo, asertan-

te , ke Dio estas por ĉiam nia Sinjoro, ke nia plej esenca respondo estas nia absoluta konfido al li kaj nia adoro al Dio".

ĜENOVA FAMILIO, en kiu Dio rikoltis larĝe, estas la familio de ges.oj Angelo kaj Gerina Marconcini. El ili aj 11 gefiloj 9 aŭskultis la inviton de la Sinjoro, kiu al vokis ilin al sia servo. Du filoj edziĝis; kaj unu alia estas sacerdoto en Ĝenovo, la kvara estas misiisto en Kenjo. La sep filinoj (el kiuj ses vivantaj) fariĝis ĉiuj reliĝiulinoj, kvin klaŭzuraj kaj unu misiistino en Kolombio. Pridemandite, s-ino Marconcini diris: Misioj estis ĉiam mia sopiro kaj tiu de mia edzo. Post nia nupto ni nin dediĉis al misia propagando, kaj ĝis kiam la nombro de niaj geinfanoj tion permesi, ni laboris kaj preĝis multe tiucele. Estas aparte granda ĝojo por mi havi du misiistajn filojn".

LA ITALA REVUO "Mondo e Missione" memorigas per sia numero de Januaro 1971 sian viv-jarcenton. Ne estas ofta evento: en Italujo inter la pli ol du mil periodajoj, malpli ol tridek atingis aŭ superis la jarcenton. Ĝi estas pro sia longa sperto, pro sia preciza temo, pro la sindono de siaj kunlaborantoj, unu el la plej bone redaktitaj revuoj kaj ĝi atingas tre vastan nombron da legantoj.

POST LA UNUA "EVOLUIGA JARDEKO" (1960-1970) dekretita de ONU por organizado de subevoluintaj landoj, alia nova komenciĝas ĝis 1980, ĉar la celoj, kiujn la unua intencis, ne estis atingitaj: fakte, la enkonduko de malriĉaj popoloj al la progreso estas grandparte ne efektivigita. Kard. Maurice Roy, prezidanto de la papa komisiono "Justeco kaj Paco", sendis dokumenton al Sekretario de ONU, U Thant, kiu reprezentas unu el la plej kompletaj kaj akrevidaj analizoj pri subevo-

luo en la mondo. Ĝi pruvas, ke malgraŭ la bonaj intencoj de la helpantoj, oni ne povos malhelpi, ke la riĉaĵoj kresku pli kaj pli en la manoj de malmultaj, dum la malriĉuloj falos pli kaj pli en la sklavecon de la mizero. La kardinalo proponas rimedojn laŭ naciaj kaj internaciaj niveloj, kaj certigas, ke la katolika eklezio klopodos ĉiamaniere por doni ankaŭ al malriĉaj popoloj esperon pri estonteco.

DUM LA PRESADO DE ĈI TIU BULTENO, nur ĉi-momente, ni ricevas respondon de la anstataŭanto de la papo al nia ofero, pri kio ni diris je p. 4-a. Ni plezure donas ĉi tie la tradukon de la valora letero:

El la Vatikana Ŝtato
Ŝtata Sekretariejo 22-1-71

Respektinda Patro,

Kun aprecita ĝentileco vi bonvolis transdoni al la Sankta Patro por la inunditoj de Pakistano, £. 100.000, kolektitajn iniciate de la Katolikaj Esperantistoj. Mi ĝojas komuniki al vi, ke via karitata agado estis akceptita kun patra sento de la S. Patro, tre dankema al ĉiuj, kiuj ebligas lin helpi tiom da suferantaj filoj. Antaŭ tiel delikata kristana bonfaro kaj kunsento al la zorgoj de lia universala ofico, la Vikario de Kristo petas de la Sinjoro abundajn ĉielajn rekompencojn, pri kiuj estas garantiaĵo kaj aŭspicio la Apostola Beno, kiun li elkore liveras al vi kaj al ĉiuj malavaraj donacintoj.

En la Sinjoro, tre sindone

J. Benelli, Anstataŭanto

LA SVISAJ KATOLIKOJ sin pretigas al la "Sinodo

72-a". La episkoparo enkondukis masivan popolan konsultadon pri la temoj pritraktendaj, adresante karton al ĉiu fidelulo. Alvenis 153.872 respondoj, krom 10143 personaj leteroj. Kalkulante kun ili la grupojn interesitajn, oni havas sumon de ĉ. 300.000 personoj partoprenintaj: unu el 5 svisaj katolikoj. Tre kontentigebla partopreno. El la unuaj deduktoj oni vidas, ke la plej interesaj problemoj estis pri geedziĝo kaj familio. Sekvas la problemoj de la junularo, de kredo, sacerdoteco, de la rilatoj inter eklezio kaj mondo kaj de ekumenismo.

KVIN FRANCAJ TEOLOGOJ, membroj de la Internacia Teologia Komisiono, protestis publike kontraŭ la klopodo enkonduki ambiguan formuligon en la novan francan tradukon de kredkonfeso. Temas pri Louis Bouyer, Yves Congar, Henry de André, Feuillet kaj Joseph Le Guillon, kiuj pri ĉi tiu argumento sin direktis al ĉiuj francaj episkopoj. "Ni opinias - asertas la kvin teologoj - ke estas nia devo altiri la atenton de la episkoparo pri la graveco de la problemoj, estiĝintaj el la traduko en nian lingvon de la du oficialaj "kredoj". Precipe ni deklaras, ke oni ne povas ŝanĝi la esprimon "Katolika eklezio" al "Universala Eklezio". Ĉi tiu nova esprimo, asertas la teologoj, emigus opinii, ke la kredo agnoskas ne iun eklezion de Kristo fonditan kaj destinitan por ke ĉiuj kristanoj estu unu en la kredo kaj en la aŭtentikaj sakramentoj kiel ankaŭ en la fideleco al la legitimaj gvidantoj, sed tute simple iun nevideblan eklezion, en kiu ĉiuj kristanoj povas vivi en kuneca spirito, malgraŭ siaj disiĝoj. Male, konkludas la teologoj, la vorto "katolika" ĉiam indikis eklezion videble unikan en la aŭtentikeco de la kredo, de la sakramentoj kaj de la hierarkio, opozicie al ĉiuj aliaj komunoj, kiuj ne havas ĉi tiujn notojn".

FRATO FIDELIS MOUS, EKS-MISIISTO en Indonezio, zorgis dum 20 jaroj pri mirinda serio de 432 bildoj pri evangelio, kolektitaj kiel filmetoj, diapozitivoj kaj ilustritaj libretoj, por helpi finance al la misioj, liverante samtempe valoran donacon al la aĉetantoj. Ni povis vidi kelkajn el tiuj desegnoj, kaj ni estis surprizitaj pro ilia beleco. Tre volonte ni rekomendas ilin. Oni adresu petojn al: Brother Fidelis Mous, - Stichting Docete - Oude Amersfoortseweg,79 - Hilversum - Nederlando.

LA RUSA ORTODOKSA EKLEZIO preparas la elekton de la nova patriarko de Moskvo, post la morto de Alekso en aprilo de la 1970-a. La rimarkinda prokrasto de ĉi tiu elekto estis motivita pro la decido de unu funebra jaro. Intertempe oni starigis preparan komisionon, gviditan de Mons. Pimen, regento de la Patriarkejo, kun Mons. Nikodim, metropolito de Leningrado kaj mons. Alekso de Tallin, kiuj kune agadas, kvazaŭ triumviraro por la internaj aferoj de la eklezio, la rilatoj kun la registaro kaj kun la aliaj kristanaj eklezioj. Oni ne scias ankoraŭ la precizajn procedurojn de ĉi tiu elekto, ĉar la tri antaŭaj patriarkoj (la patriarkato estis interrompita dum du jarcentoj, dum kiuj la Sankta Sinodo direktis la Rusan Eklezion), t.e. metropolito Tikhon, mortinta la 25-a de marto 1925, Alekso, metr. de Leningrado, m. la 15-an de majo 1944, kaj mons. Alekso, estis elektitaj laŭ diversaj proceduroj pro la diversaj cirkonstancoj: per elekto fare de asembleo kun sorteltiro pri la unua; per aklamo ĉe malvasta kolegio pri la dua; per publika kaj unuanima elekto en koncilo pri la lasta. Kiel ajn, oni intencas ĉifoje aŭskulti per koncilo la tutan rusan eklezion kun ĝiaj episkopoj kaj reprezentantoj elektitaj

de sacerdotoj kaj laikuloj.

NI RICEVIS KUN PROFUNDA ĈAGRENO informon, ke s-ano sac. Jozef Dolezal en Ujezd (Ĉeĥoslovakio) subite mortis pro infarkto la 1-an de januaro ĉi-jare dum la la diservo antaŭ la kripo. Li alte aprecis nian agadon kaj aparte nian bultenon Katolika Sento. Animo pura! La Dia ĉefsacerdoto certe tre amis lin kaj ĉirkaŭprenis sian fidelan servanton, kiu alportis al la Di-Infano en la kripo sian plej valoran donacon, la propran vivon.

EN "UJ EMBER" (NOVA HOMO), semajna organo de la katolika eklezio en Hungarujo, nia tre malproksima amiko tradukis kaj konigis al ni ĉi tiun mallongan gloson pri kredo. Ni opinias, ke ĝi povas helpi al la katolika sento de niaj legantoj:
"BEDAŬRINDE, KE MI NE HAVAS KREDON!" Ofte oni povas aŭdi tiun ĉi frazon, ĝenerale kun nostalgia ĝemo, kun la akcento de senpova rezigno.
De kie oni havas la kredon kaj kio estas la kredo? La kredo estas donaco de Dio, mirinda donaco de Kristo, kiun ĉiu kristano ricevas je sia baptiĝo pere de la Eklezio. Ĝi ne estas sento, ne opinio, ne konvinkiĝo rezulte de logika pensado, nek socia kutimo, - sed plej unue graco. Tiu ĉi graco helpas al ni, ke ni renkontu Jesuon, ebligas por ni akiri certecon, ke la atesto de Kristo pri la Patro estas aŭtentika.
Havante tiun ĉi certecon, la kredo rezultigas, ke per la vido ke Kristo ni ekvidu nin mem, la aliajn homojn, la fenomenojn, Dion mem - kaj ni ekagu konforme al tio.
La graco de Dio, la amo de Dio neniam malestas: kiu sincere klopodas gardi kaj evoluigi sian kredon, ties kredo - eĉ spite krizojn - fariĝas pograde pli perfekta ĝis ĝi atingas la plej altan nivelon.
Sur tiu ĉi nivelo oni jam ne dividas sian vivon. Unusola

klopodo plenigas la tutan ekziston: tiu, ke oni en Kristo - kun Li kaj per Li - progresigu, eĉ ankaŭ per la plej malgranda faro, la planon de la Patro en tiu ĉi mondo: la plenumiĝon de la agado de l'savo.

KARD. RICHARD CUSHING, ĉefep. de Bostono, forpasis la 2-an de la pasinta novembro. Li estis ĉiam soifanta pri animsavo kaj disvastigo de kredo. En la 1959-a li fondis la "Societon de S. Jozefo" por helpi siajn diocezajn sacerdotojn dezirantajn labori en misilandoj. Tiel centoj da ili povis plenumi sian deziron de pli sindona servo al Dio kaj al animoj. Kaj li testamentis, ke ĉiuj liaj bonoj devos esti transdonataj al neniu alia ol al misioj.

NOVAJ ORIENTIĜOJ EN LA PRIZORGO de religiaj vokiĝoj estas serioze pristuditaj en Karakaso (Venezuelo). La ĉefurbo estas ankaŭ la ĉefdiocezo pli loĝata: 1.876.937 loĝantoj, kiuj en la 1975-a atingos, laŭ la antaŭkalkuloj, la nombron de 2.650.000. La lokaj sacerdotoj estas 97 (57 diocezaj kaj 38 religiuloj), dum la fremdaj estas 488 (unu el la plej altaj procentoj de la Latina Ameriko). La nombro de la loĝantoj por ĉiu dioceza pastro estas 32.929. Por konservi ĉi tiun proporcion necesus tri novaj pastroj ĉiujare, dum nun la meznombro estas du. Dum la lastaj 3 jaroj 7 novaj sacerdotoj ordiniĝis, sed 11 perdiĝis! El la 23 studentoj de la alta seminario, 19 estas adoltaj vokiĝoj. Pro ĉi tiu sperto la diocezo de Karakaso decidis orientiĝi al ĉi tiu vokiĝtipo. Oni estigis "Porpastran Junularan Koncilion" kies ekipo preparas planon por vokiĝoj de plenkreskuloj. Oni sin direktas al la junuloj anstataŭ al iliaj familioj, ĉar ordinare la vokiĝoj devenas de ĉi tiu organizo. La unua "Latin-Amerika Kongreso por Vokiĝoj" okazinta en Limo (Peruo) alvenis al la samaj

konkludoj: "Ni opinias, ke la porvokiĝa apostolagado devas sin turni ĉefe al junuloj, studentoj kaj laboristoj..."

EN DIVERSAJ ŜTATOJ de la Latina Ameriko, trafitaj de la plago de analfabetismo, pli kaj pli da sukceso atingas la iniciato de baza edukiĝo pere de radiel-sendaj stacioj. Tiamaniere per ĉi tiu moderna rimedo, precipe en Kolombio, en Amazonio kaj Bolivio, kie la distancoj kreas gravajn malfacilaĵojn, oni superas la nesufiĉon de lernejoj kaj instruistoj. En Kolombio la radio "Sutatenza" havas 180.000 lernantojn kaj 22.781 radiofonajn lernejojn, tio estas hejmajn lernejojn, kie ĉiuvespere dum 4-5 monatoj kaj ĉirkaŭ cent lecionoj, partoprenas po 10-15 lernantoj kuniĝintaj el la plej proksimaj domoj. En Bolivio ekzistas 6 radistacioj, kiuj povas atingi ĉiujn punktojn de la vasta regiono. Unu el la plej bone ekipitaj estas la radistacio de Oruro, estrata de p. Jacques Gélinas, de la oblatoj de la Senmakula Maria.

LA NOBEL-PREMIO POR PACO de la 1970 estis donita al Norman Borlaug, kiu sukcesis produkti novajn grensemojn, kiuj kapablis ŝanĝi Pakistanon, pro ĝia duobla produkto, al regiono, kiu povas jam vendi al aliaj sian surpluson. Ankaŭ Hindujo pasis el la 12 milionoj da tunoj de la 1965-a al 21 t. en la printempo de la 1970-a. La tekniko de Borlaug estas la plej konvinka pruvo, ke danĝero al bonstato de la mondo ne venas el la kvanto de la loĝantaro sed de tia naskiĝkontrolo kiu ne atentas la senmezurajn produkteblecojn de la naturo kaj la terurajn kapablojn de la tekniko aplikata de l' homa genio.

PRI LA MALRIĈECO DE LA EKLEZIO en la Tria Mon-

do, ni resumas el revuo "Mondo e Missione" leteron de laika misiisto, kiu pasigis diversajn jarojn en Afriko kaj de kelka tempo troviĝas en Azio. 'Oni diras, ke en landoj malriĉaj, ankaŭ la eklezio devas esti malriĉa. Sendube, li skribas, la hinda eklezio ŝajnas riĉa: grandaj konstruaĵoj, lernejoj, abundaj mon-rimedoj ; sacerdotoj kaj religiulinoj vivas bone kaj havas eblecojn por vojaĝi, studi, zorgi pri karitataj entreprenoj. Sed la tuta riĉeco de la eklezio estas por la malriĉuloj, por entreprenoj favore al ili. Ĉie mi miris pro la multenombraj kaj diligente zorgitaj karitataj, poredukaj, asistaj helpaj entreprenoj; pro la novaj vilaĝoj konstruitaj de misiistoj, modelaj farmobienoj, hospitaloj, leprulejoj, orfejoj ktp. Tro longe estus diri ĉion, kion la eklezio efektivigis en Hindujo pri la socia kampo favore al malriĉuloj. Viaj misiistoj en Warangal, Khammameth, Vijayavada, Elluru kaj en multaj aliaj regionoj faris mirindaĵojn: hodiaŭ la hindaj sacerdotoj daŭrigas ilian laboron kaj la tuta eklezia organizo estas karitato kaj helpo al malriĉuloj. Se ni komparas kun hinduismo, ni facile konstatas, ke kvankam la temploj estas fastaj kaj riĉaj, la hinduaj sacerdotoj sindediĉas preskaŭ nur al pilgrimoj, al preĝado, sed sen zorgoj por la aliaj. Ĉe la temploj neniam oni vidas lernejojn, magazenojn por kuracila disdono, helpentreprenoj por malriĉuloj. Oni diras, ke hinduismo nur hodiaŭ ekmoviĝas laŭ la ekzemplo de la kristanoj. Kelkaj volas, ke la karitataj organizoj de la eklezio estu kiel eble plejbaldaŭ transdonitaj al la zorgoj de la lokaj administradoj, lokaj kooperativoj kaj entoj. Sed plejofte oni devis konstati, ke tio estis la rapida fin o de tiuj entreprenoj!"



"PATRINO TERESA, kuraĝa atestanto de la vero". Esenca enhavo de la regularo de la Porkaritataj Misiistinoj estas: labori por la sanktigo de malriĉuloj en iliaj domaĉoj, zorgi pri malsanuloj kaj ekmortantoj, altiri kaj instrui infanojn vagantajn tra la stratoj, viziti kaj helpi almozulojn, doni rifuĝon al la forlasitoj. Patrino Teresa, la fondintino de ĉi tiu instituto, ricevis de la papo je la 22-a de decembro la premion " Johano XXIII", la plej alta pri paca honorinsigno. "Ŝia atesto, diris la papo, estas viva atesto de la neutopia aserto: "Ĉiu homo estas mia frato". Ŝia karitata apostolagado, aldonis la papo, ne limiĝis al la hindaj mizeruloj, ĉar ĝi jam disvastiĝas en tri kontinentojn, atingante, laŭ invito de la kardinalo-vikario la ĉirkaŭaĵojn mem de Romo. Denaska albana, ŝi eniris religian vivon unue en Jugoslavio, poste en Kalkuto; sed antaŭ la spektaklo de la terura stato de tiom da mizeruloj kaj malsanuloj, ŝi ekkonis la apartan vokiĝon, kiun Dio donis al ŝi.

Ŝi ricevis la nekutiman permeson formeti sian religian robon, kion ŝi faris la 8-an de aŭgusto 1946, por sin vesti per la blanka sario, la tipa hinda robo, al kiu ŝi aldonis lazuran zonon ĉirkaŭ la talio kaj malgrandan krucon ĉe ŝultro. Tiel ŝi intencis atingi pli facile la plej mizerajn mediojn, kaj fakte ŝi sukcesis altiri konfidon de ĉiuj mizeruloj. Baldaŭ la nombro de la asistitoj kreskis; sindonaj personoj trovis kuraĝon, post ŝia ekzemplo, sindediĉi al la sama idealo, sub ŝia gvido. Hodiaŭ la Misiaj Fratinoj de la Karitato estas preskaŭ 500. En Kalkuto ekzistas 59 karitataj entreprenoj zorgitaj de la Fratinoj de Patrino Teresa, kaj aliaj centroj estas dissemitaj ĉe 17 hindaj urboj. Aliaj domoj estas en Venezuelo, Aŭstralio, Ceylono, kaj unu en Romo, en Londono, en Tanzanio kaj Amano. La pripaca premio intencis montri al la homaro la mirindan ekzemplon de ĉi tiu kristana senmezura karitato.
(En la foto: Patrino Teresa ricevas emociite la premion de la Papo).

EN KIOTO (JAPANUJO) porpaca asembleo de nekristanaj religioj (v. ankaŭ K.S. 1970 n.12.p.23) kunigis je la unua fojo en la historio, 300 gvidantojn kaj delegitojn de religioj en la mondo. Ili apartenis al 40 ŝtatoj, kaj reprezentis buddanojn, hinduojn, musulmanojn, ŝintoistojn, hebreojn, siksanojn, jainsanojn, zoroastranojn, konfuĉanojn, ktp. Sed partoprenis ankaŭ multaj protestantoj, katolikoj kaj ortodoksoj. Malĉeestis buddanoj de Ĉinio kaj de la Norda Vietnamo. Mons. Edward G. Murray el Bostono deklaris: Mi firme kredas, ke la religio estas la unika forto, kiu povas gvidi homon kontraŭ liajn antaŭjuĝojn, egoismon, kaj nacian orgojlon. Pro tio necesas, ke la religiaj

gvidantoj strebu ĉe l'aregistaroj, ĉar ĉi tie oni premas la ordonstartilon. D.ro Dana McLean Greeley diris: Se la kanibalismo estis forradikita per morala agado, ankaŭ fratmortigo, tio estas milito, estos forradikita per komuna morala agado. Unu el la plej signifaj interve - noj estis tiu de dom Helder Camara, episkopo de Olinda kaj Recife (Brazilo). Li deklaris, ke paco ne povas ekzisti, kie mankas justeco. Kaj internacia maljusteco estas, ke malmultaj ŝtatoj riĉiĝas dum mul - taj aliaj kaj tutaj kontinentoj iras renkonte al pli granda mizero kaj subevoluo: la aktuala internacia politiko, laŭ kiu la kosto de la krutaj materioj estas fiksita de la riĉaj nacioj, akcentos pli kaj pli malegalecon kaj maljustecon. Kaj li proponis tri punktojn, kiujn ĉiuj religioj povos akcepti: "1ª: Paco estos realo nur kiam ekzistos justeco. 2ª: Oni devas tuj analizi la situacion de ĉiu regiono, nacio aŭ kontinento por evidentigi la maljustecojn, kiuj endanĝerigas la pacon. 3ª: Sen malamo, sen incito al perforto, tamen sen timo kaj kun firmeco ni denuncu maljustecon kiel gravan malhelpon al la paco: maljusteco estas fonto kaj kaŭzo de perforto". Grandan resonancon en la mondo kaj ĉefe en Eŭropo havis ĉi tiu konferenco, kaj ĝi instigis al pli energia agado kelkaj naciojn, favore al la malriĉaj. Bedaŭrinde en Italujo la gazetaro preskaŭ tute silentis pri tio.

MONS. MARIO MGULUNDE, juna afrika episkopo vizitis multajn italajn diocezojn por serĉi helpojn. Li ricevis kun danko materiajn donacojn, sed trovis eĉ ne unu preta sekvi lin kiel misiisto. Li malĝoje konstatis kiel malpliiĝis fervoro pri misioj. Oni asertas, li diras, ke la misilandaj eklezioj rajtas pri sia libereco, kaj pri sia memregado. Teoriaj vortoj! Tute alia estas la realo: Afriko bezonas misiistojn, kaj estus dan

ĝere, se ili mankos, dum ĝi ekmarŝas al promesplena progreso, kun tiom da kreskiĝantaj kristanaroj kaj da katekumenoj, kiuj petas instruon de la evangelio.

KONSEKRO DE LA NOVA EPISKOPO de Zomba,(Malavio) mons. Mathias Cimole, okazis en la katedralo de Lusaka, kun la ĉeesto de multaj episkopoj kaj religiuloj, kunvenintaj el la tuta regiono. Ĉeestis ankaŭ la tuta Diplomata Korpuso kaj ĉiuj reprezentantoj de la diversaj kristanaj konfesioj. Post la ceremonio okazis solena akcepto en "Luanga Social Centre". La prezidanto de la Malavia respubliko, d.ro H.K.Banda, prenis la okazon por bondeziri al la nova episkopo, reliefigante la gravecon de ĉi tiu investo, kiu vokis al la spirita gvidado de la diocezo de Zomba, por la unua fojo en la historio de la lando, malavian episkopon.

ANKAŬ KENJO, sekvante la ekzemplon de Tanzanio, adoptis la svahilon (bantua ĵargono), kiel nacian lingvon. La merito de ĉi tiu elekto, kiu faciligos la komunikojn en la tuta lando, estas grandparte de misiistoj, kiuj de pli ol duonjarcento kompilis gramatikojn kaj vortarojn, kaj presis multajn librojn kaj broŝurojn. Du misiistoj estis ĉefe agnoskitaj majstroj en la svahila: P.Charles Sacleta (+1943) kaj P.Alphonse Loogmann (+1964). La kristanoj adoptis la svahilan por la liturgio, kiel ankaŭ la musulmanoj. Kaj ĉi tio montriĝas ja grava, se oni konsideras la alligitecon de musulmanoj al la araba lingvo.

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

"Kristana unueco estas sen papa ofico neimagebla".
(Kilmer Myers, el Episkopala Eklez)

oooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooooo

Lastegmomenta pertelefona informo el Klagenfurt (Aùstrio), la 4-an de februaro 1971, je la 21,30 horo:

SAC. FERDINANDO LONGONI

Par. de Limbiate - Milano

ESTAS LA NOVA IKUE - PREZIDANTO

KATOLIKA SENTO, dankante al Dio, plaùdas pro la plena venko de la sana parto de IKUE, kiu volis savi ŝin fidelan Asocion el gravaj devojiĝoj,

kaj sendas al Sac. Ferdinando Longoni, sia amata Respondа Direktoro, kiu kondukis kuraĝe la batalon, la plej varmajn gratulojn.

La Sinjoro, kiu helpis nin por la unua paŝo al la ĝusta direkto, donu al la nova Estraro gracojn kaj lumon por atingi la sanktajn celojn de la origina programo!

En la venonta numero ni donos pli precizajn informojn.